Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 21-an de septembro 2017 per Skype

Aprobita la 26.10.2017.

Partoprenis:
Mario Machlik en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Lars Sandbakk en Sandnes
Amelie Matt en Tromsø
Ulf Lunde en Os, ekde punkto 3.

0. Tagordo
Aprobita

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 31-an de aŭgusto
Aprobita

2. **Ekonomio**
La ciferojn la kasisto prezentos poste. (*Skagen høyrente*: 131.786,- *Skagen Vekst*: 59.319,-)
Pluraj kluboj ricevis leteron de la bankoj kie oni havas siajn kontojn, ke oni bezonas urĝe havi registradon ĉe Brønnøysund-registeret alimeniere oni perdas la aliron al siaj kontoj. Ni devus esplori, ĉu la kluboj povus havi la registran-numeron de NEL tiel evitante multe da burokratio.

3. Farendaĵoj post la Landa Kunveno, protokolo
La protokolon Anne Karin pretigos kiam ŝi havos tempon, sed nuntempe ŝi estis tre okupita pro nova laboro.
La laborplano aperis en Norvega Esperantisto nr-o 3, sed estus bone afiŝi ankaŭ en nia retejo.

4. Ekzameno en Norvegio?
La praktika utilo de ekzamena diplomo estas tre malgranda, ĝi estas pli-malpli simbola. Sed nuntempe NEL ne plu havas eĉ Ekzamenan Komisionon kaj ne povas oferti “oficialan” E-ekzamenon al siaj membroj. Ĉu ni devus starigi novan sistemon por ekzamenoj kaj ekzamenistoj? Ĉu tio entute estas bezonata? Otto Prytz kaj Mario ekdiskutis tion dum la Landa Kongreso.
La Estraro kontaktos Otto, demandante ĉu li volas gvidi laborgrupon pri tio.

5. Eventualaĵoj
Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.30h ĝis 20:35h.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 26/10 je la sama horo.

Raportis: Mario Machlik ĝis punkto 3, Ulf Lunde ekde punkto 4,